MARK THE DATES ON YOUR CALENDAR ---- DETROIT JULY FIRST SECOND and THIR
1 9 3 6 29th ANNUAL CONGRESS E. A. N. A. 1 9 3 6

# AMERIKA ESPERANTISTO / AMERICAN ESPERANTIST

La Monata Bulteno de la Esperanto Asocia de Norda Ameriko — The Monthly Bulletin of The Esperanto Association of North America

Joseph R. Scherer, President, Los Angeles, California. Joseph Leahy, Gen. Sec. James F. Morton, Vice-President Paterson, N. J.

Centra Oficejo - 1517-H-Street, N. W., Washington, D. C. - Central Office

VOLUME 49 No. 3 - 10¢ per copy - $1.00 per copy - January 1936

# VORTOJ DE LA PREZIDANTO

NOVA JARO - NOVAJ CELOJ. Jen nova jaro komenciĝas. Nova kuraĝo estas necesa...kaj nova optimismo. Same kiel en la ĉiu-taga vivo de la unuopaj homoj, familioj kaj nacioj....tiel ankaŭ ĉiu unuopa samideano, ĉiu unuopa Esperanto-klubo, ĉiu unuopa nacia Esperanto-asocio kaj la tuta Esperanto-mondo devas fari novajn rezoluciojn, kaj decidas komenci la novan jaron kun nova espero.

Oni diras ke ni Esperantistoj estas ĉiamaj esperantoj. Nu, sen multa espero nia majstro ne estus kreinta Esperanton; sen espero nia Esperanto-movado ne estus tiel granda hodiaŭ, kiel ĝi jam estas.

Sed espero sole ne sufiĉas! Nia movado povas kreski nur se vere agemaj gesamideanoj unuope varbas kaj instruas, kaj se sinceraj gvidantoj gvidas, kuraĝe kaj per multa laboro - ne sole per espero. Sed eble eĉ pli grave por la bono de la Esperanto-movado estas se ĉiu unuopa samideano pli-perfektiĝas sian scion de Esperanto. Kial ne tion fari dum 1936 ?

Nenio estas pli mizera ol Esperanto-klubo en kiu nur unu el kvin povas paroli nian belan lingvon. Sed tiaj kluboj ekzistas. Ofte mi respondas al ne-esperantistoj, ke "La kialo pro kiu multaj homoj ne lernas Esperanton estas ĉar oni devas uzi la kapon". Eĉ la relative malmulta cerba laboro necesa por lerni Esperanton estas tro multa por la grandaj homamasoj.

Samo oni devus respondi al aliaj demandoj, ke "La kialo pro kiu multaj samideanoj ne lernas Esperanton pli bone estas ĉar ili ne sufiĉe diligente ekzercas. Okaze gesamideanoj ne povas kompreni fluan Esperantan paroladon....sed ili devus lerni "aŭskulti pli rapide" per iom pli da studado, per laŭta legado de Esperantaj libroj kaj gazetoj, aŭ per la ĉeesto ĉe perfektigaj kursoj aŭ ĉe spertularaj kunvenoj.

La plej bona metodo por lerni Esperanton pli bone estas per la fiksado de definitiva celo. Vi povas trafi la celon nur per koncentrita rigardo al ĝi. Kaj la plej taŭga metodo por lerni Esperanton pli bone estas celi al diplomo. EANA donas tri diversajn diplomojn: Diplomo pri lernado, diplomo pri kapableco, kaj diplomo pri instrua kapableco. Jam la unua estas bona kaj inda celo. La dua donos al vi eĉ pli da kontenteco kaj feliĉeco; la tria donas al vi publikan ateston ke vi estas plej lerta instruisto. Depost 1936 la plej lertaj gesamideanoj povas akiri eĉ pli malfacilan ateston, nome la Akademian Diplomon de la Amerika Esperanto-Akademio.

Kompreneble ekzistas multaj lertaj samideanoj kiuj neniam akiris diplomon. Same ekzistas multaj tre saĝaj homoj kiuj neniam akiris la doktoran titolon. Sed per iom da sistema studado vi povas facile atingi la honorojn de diplomo, kaj samtempe ĝi estas inda celo, kaj la plej rekta metodo por lerni Esperanton pli bone. La alta celo de D-ro Zamenhof estis krei belan kaj utilan lingvon; la celo de ĉiu samideano kaj samideanino estu bone ĝin lerni.

Postulu informojn kaj konsilojn de nia estiminda D-ro Edwin L. Clarke, Estro de la ekzamena komitato. Ĉu vi ne volas decidi en la nova jaro tuj komenci celi al diplomo - kaj tiel fariĝi pli lerta Esperantisto por la bono de nia movado?

Joseph R. Scherer.

# REPORT OF THE FINANCE COMMITTEE

December 15, 1935

With replies from over a third of our members -- thirty four and one half per cent, to be exact -- donations to the debt retirement fund now total three hundred thirty one dollars and twenty five cents. And encouraging as these figures may be, they do not tell the whole story, for there are still substantial pledges outstanding which will eventually boost the total.

Meanwhile two more states, VERMONT and DELAWARE, have been added to that select group --COLORADO, IOWA, RHODE ISLAND and ARIZONA-- in which the canvass is complete. In a number of others the goal would have been reached but for the tardiness of one or two members. We earnestly hope that all who have been delaying their replies until after Christmas will give this matter their attention now, so that we can reward the patience of E. A. N. A. creditors by making the New Year a prosperous one for them.

Following is a list of the donations received from November 16 to December 15, 1935:

| | |
|---|---|
| CALIFORNIA. C.R.W., $2.00 | $ 2.00 |
| CONNECTICUT. S.K., $5.00 | 5.00 |
| DELAWARE. G.N., $1.00 | 1.00 |
| WASHINGTON, D.C., H.G., $1.00 | 1.00 |
| ILLINOIS. A.S.K., $1.00; E.K.R., $ .50 | 1.50 |
| MICHIGAN. A.I.R., $2.00 | 2.00 |
| MINNESOTA. Anon., $1.25; H.E.M., $1.00 | 2.25 |
| NEW YORK. L.D., $1.00; W.D., $2.00; H.S., $5.00 | 8.00 |
| OHIO. G.J., $1.00; E.A.F., $1.00 | 2.00 |
| OREGON. F.E., $3.00 | 3.00 |
| PENNSYLVANIA. H.W.H., $5.00; F.L.H., $1.00; M.E.C., $ .50 | 6.50 |
| TEXAS. K.P., $1.00 | 1.00 |
| VERMONT. N.M.G., $2.00 | 2.00 |
| VIRGINIA. C.C.B., $2.00 | 2.00 |
| HAWAII. H.L.T., $5.00; K.S., $2.00 | 7.00 |
| | $ 46.25 |
| Previously acknowledged (Reports of Oct. 15 and Nov. 15) | 285.00 |
| Total to date | $331.25 |

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

# LIST OF COMMITTEE MEMBERS 1935-36

We cannot print each month the full list of the Committees organized by E.A.N.A. for the current year. So please make a mental note, that you may find the names of members by looking back in your JANUARY issue of Amerika Esperantisto.

EXECUTIVE: E. G. Dodge, 1301 Mass. Ave., N.W., Washington, D.C. (Acting as Chairman by President's request.)
Joseph R. Scherer, 4474 West Adams Blvd., Los Angeles, California.
Joseph Leahy, 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.
J. J. Sussmuth, Humber Bay, Ont.

FINANCE: Fred H. McMann, Chairman, 169 Hoosic St., Troy, New York.
H. B. Hastings, 630 Washington Bldg., Washington, D. C.
Wm. G. Adams, 219 Public Safety Bldg., Seattle, Washington.

PROPAGANDA: S. C. Eby, Chairman, 320 E. 42nd Street, New York City.
Rev. Giles H. Sharpley, St. Andrews Church, Waverly, Iowa.
Rev. John H. Fazel, 1122 W. 8th Street, Topeka, Kansas.

PUBLICATION: Prof. A. Kengott, Chairman, University of Texas, Austin, Texas.
Prof. H. W. Hetzel, 119 So. 37th Street, Philadelphia, Pennsylvania.
Prof. Fred A. Hamann, 611 83rd Street, Wauwatosa, Wisconsin

Additional Committees and the various members listed on the following page.

LIST OF COMMITTEE MEMBERS, 1935-36.(Continued).



EXAMINATIONS: Prof. Edwin L. Clarke, Chairman and sole member, Box 14, Winter Park, Florida.

ESPERANTO IN SCHOOLS: Prof. Louis Dormont, Chairman, 123 E. 35th St., Brooklyn, N.Y.
Prof. Gilbert Nickel, Middletown, Delaware.
Prof. Joseph W. Dubin, 808 W. Sedgwick St., Mt. Airy, Phila. Pa.

ESPERANTO PRESS SERVICE: Woodruff W. Bryne, Director, 211 Washington St., Atlanta, Ga. (Mr. Bryne's collaborators, indefinite in number, are called "Reporters," and are being recruited in all sections of the territory of E. A. N. A.)

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

# YOUR "ESPERANTO MILESTONES"

We call particular attention of each reader to page one, where President Scherer emphasizes the advantages which come to you as an Esperantist if you take, one after the other, the several examinations which E.A.N.A. offers through its Examinations Committee, Professor Edwin L. Clarke, Box 14, Winter Park, Fla. Just as in school you prized the formalities of recognition when you graduated from grammar school, from high school, or from business or professional school, so in your Esperanto the working toward definite and recognized goals is a spur to effort and a satisfaction after effort.

Those who as Esperantists are "new in the faith" should take first the elementary examination. But those already pretty well grounded in the study may omit that step and may compete at once for the "Atesto pri Kapableco."

The two dollar charge is necessary for limiting the examination to those who are not mere curiosity seekers, but who really "mean business." But your fee comes back into the treasury of the North American Association, where it helps the common cause.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

CHAIN LETTERS - From the "Waverly (Iowa) Democrat" of Dec. 6th; "The chain letter has appeared again but in a different form. The suggestion comes simultaneously from Hungary and Germany to the Esperantists in Waverly that they use the chain letter idea for the exchange of illustrated post-cards with greetings in Esperanto. The local "Geesperantistoj" have adopted the plan.

It is estimated that the members will receive as many as 256 illustrated cards from each chain. By choosing persons from different places whose names appear in the correspondence columns of the Esperanto periodicals, the cards will make a most interesting collection of pictures, memorial stamps and greetings from all over the earth. Already the returns are coming in.

The local group was honored recently by the Rev. G. H. Sharpley, its leader, being made a member of the Propaganda Committee of the North American Esperanto Association."

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

500 HIGH SCHOOL STUDENTS gave rapt attention to a 40 minute talk on the advantages and beauty of Esperanto, by Rev. Giles H. Sharpley, in Waverly, Iowa. (Only a most interesting subject, handled by a most proficient speaker can hold any audience 40 minutes -- Well! It Is and He Is.)

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

NEW ESPERANTO EMBLEMS - Green Star with Golden "E" in center - a unique feature is the Golden Ball Protectors on star points - eliminating all danger of injury from that source. The emblems are of the same type as the expensive lodge and fraternal buttons selling for a dollar or more. The price we are offering them for is due to our desire to have the Green Star worn proudly by every Esperantist. Choice of fastenings - Screwback 40¢ - Security pin 50¢. Order from Central Office E. A. N. A.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

# AMERIKA ESPERANTO-AKADEMIO

Laborplano, Sekcio "Aproba Komitato"

1. -- Aprobitaj Verkaĵoj.

Temas ĉi tie nur pri legaĵoj, (rakontoj, romanoj, artikoloj, ktp.,) ne pri lernolibroj.

La Aproba Komitato akceptos manuskriptojn kaj verkaĵojn ĉiuspecajn por ilin aprobi aŭ malaprobi, kaj ĉiu ano de la komitato tralegos ilin tre zorge kaj severe.

Se la komitatanoj juĝos unuanime ke unu aŭ alia el tiuj verkaĵoj estas bonega, laŭ stilo, gramatiko kaj enhavo, la estro de la komitato sendos la verkaĵon kune kun sia rekomendo al la prezidanto, kiu donos skribitan ateston pri la bonkvalito de la verkaĵo al ĝia aŭtoro, subskribitan de la estro de la komitato, de la prezidanto kaj de la sekretario.

Se post la ricevo de tiu atesto la verkisto deziros publikigi sian verkaĵon, li rajtos meti sur la titolpaĝon la vortojn: "Aprobita de la Amerika Esperanto-Akademio." -- Se temas pri verkaĵo jam eldonita, la verkisto rajtos meti tiun surskribon per stampile sur la titolpaĝon de la ankoraŭ ne venditaj ekzempleroj aŭ sur la titolpaĝon de nova eldono.

2. -- Rekompenco.

La verkisto antaŭpagos al ĉiu ano de la komitato kiu tralegos la verkaĵon, unu dolaron por ĉiu cento aŭ parto de unu cento da normalaj paĝoj, (skribmaŝine: inter spacaj linioj,) kaj, se la verko estos aprobita, unu pluan dolaron al la Akademio por la atesto. -- Antaŭ ol la verkaĵo estos definitive akceptita de la komitato, ĝia estro (aŭ help-sekretario) informos la ceterajn anojn de la Akademio pri tio, por ke ili sciu antaŭe kion oni aprobas en la nomo de la Akademio kaj havu oportunan okazon protesti aŭ ekzameni se iu propono ne ŝajnos al ili akceptinda.

3. -- Rekomenda Listo. -

La Aproba Komitato okupos sin ankaŭ pri jam eldonitaj libroj, kaj starigos listojn de rekomendindaj libroj, kiuj aperos de tempo al tempo en la "Amerika Esperantisto". Pri tiu aranĝo la helpsekretario informos la diversajn eldonistojn, kaj ili povos sendi la librojn, kiujn ili deziras rekomendi por la listo, po unu ekzemplero al ĉiu ano de la Aproba Komitato.

Ne temas ĉi tie pri lernolibroj, nur pri legaĵoj, (rakontoj, romanoj, ktp.,) aŭ gazetoj kaj revuej.

Ĉi tiu aranĝo koncernas nur la eldonistojn al kiuj la Akademio sendos inviton prezenti librojn tiucele.

Post la akcepto de unu aŭ pluraj libroj por la enlistigo flanke de la komitato, la estro de la komitato (aŭ la help-sekretario) sendos la liston al ĉiuj membroj de la Akademio, por ke ili sciu antaŭe kion oni rekomendas en la nomo de la Akademio, kaj havu oportunan okazon protesti se iu rekomendo ne placos al ili. (Protestojn oni sendu al la prezidanto por eviti komplikaĵojn aŭ miskomprenon.) La akademianoj, kompreneble, ankaŭ rajtas rekomendi al la komitato librojn por la enlistigo.

Plue, la eldonistoj rajtas meti en siajn katalogojn la vortojn: "Rekomendita de la Amerika Esperanto-Akademio" sub la titolo de la koncerna libro.

James F. Morton,
Estro de la Aproba Komitato.

A. Kenngott,
Prezidanto de la Akademio.

Joseph R. Scherer,
Sekretario-Kasisto de la Akademio.

# THE AMERICAN ESPERANTO ACADEMY

This is an independent body of Esperanto scholars, first organized in 1935, to work in specialized fields of their own election. Similar bodies under various names are found in several European countries. The Academy, though not an integral part of E. A. N. A. nor subject to its direction, will look to the Estraro of E. A. N. A. at prescribed times for the nomination of suitable additional Academy members. The present charter members of the Academy, eight in number, are: Prof. A. Kenngott, (now President), Dr. Lehman Wendell, (now Vice-President), Joseph R. Scherer, (now Sec. Treas.), Karl Froding, William S. Benson, James F. Morton, F. A. Hamann, Prof. Edwin L. Clarke. We have taken pleasure in printing (on the preceding page), part of the Academy's "Plan of Work", as formulated by its members.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

PAINLESS ENROLLMENT - If a dollar and a half looks like too big an outlay all at once, drop a nickel, dime or quarter into a box, drawer, etc., a few times a week. You'll be surprised how soon, and easily you will have enough to renew or become a member of the E. A. N. A. Students pay 10¢ at each lesson and at the 15th they are full fledged members. ALSO - and this should be in very large CAPITALS - <u>IN SAVING UP FOR THE DETROIT CONGRESS. OH BOY!</u>

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

UNIVERSITY OF WASHINGTON, (Seattle) - has in its library a fair collection of Esperanto Textbooks, Dictionaries, Histories etc. Also in the same city, the Public Library carries over two dozen Esperanto titles of best authors, including stories, histories, textbooks, etc. All up-to-date Libraries are aware that Esperanto "HAS ARRIVED" and are stocking up their shelves accordingly.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

Beginning January, 1936, "Scienca Gazeto" will be printed on 24 pages and a cover. Besides that, the first half of the magazine will be printed in larger and better type, and it will be illustrated. Thus we take three steps forward towards a bigger and better

<u>" S C I E N C A G A Z E T O "</u>

As heretofore, "Scienca Gazeto" will always be full of new and interesting information on matters of a scientific nature from all parts of the world.
A fourth step: Sample copies will be sent free. Subscription per year: only $1.00
American Esperanto Institute. 556 State St., Madison, Wis., U. S. A.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X
SE VI ESTAS AMIKO de E.A.N.A. kaj U.E.A. PAGU TUJ VIAN KOTIZON
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

Allentown, Pa. - Calvin C. Cope gave an exhibition of Esperanto in the Public Library - - - result - - - a new Esperanto Class of 15. (Good Work C. C.)

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

WEDDING BELLS - November 19th, J. C. Kensinger and Jane Schiffman, both formerly of Washington, D. C., now living in Brooklyn, N. Y. - - - Congratulations!

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

NEW! EXCELLENT PROPAGANDA! "Esperanto for the Globe-Trotter" by Isabelle M. Horn. Ten copies postpaid 25 cents. Order direct from the author at San Juan Bautista, Cal.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

HONOR GUEST. - Instead of the regular weekly class meeting of Washington (DC) chapter, Thursday evening December 26th a very enjoyable party was held at the home of the new President, Mrs. C. J. Walter. Samideano Joseph W. Dubin, of Philadelphia, was Honor Guest. The program of the evening was filled with games, refreshments and speeches.

Z*Z*Z*Z*Z*Z*Z*Z*Z*Z*Z*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X


# "YOUR" ESPERANTO CROSS WORD PUZZLE

There is no report this month on any past contest, since none was announced in November. Our next number will report on the translations of "Esperanto as a Means of Culture."


This month we are pleased to offer something novel, -- bidding our adieus to the year just ending through a very clever Esperanto cross-word puzzle on "1935" This is devised and contributed by Mr. David R. Pook, of Toronto, Ont. (The Central Office has revised a few of the definitions, for the sole purpose of making easier for all the solution of the puzzle.)

As a souvenir for those who solve the puzzle we shall send the 1931 North America Almanac. This contains among other things, the Sussmuth "Key," the translation by Mr. Hetzel of "La deveno de Esperanto," and ten pages by Armin F. Doneis on "Esperanto Progress". The premium will be sent to every person who submits a complete and correct solution of the puzzle before February first. If less than five shall score perfection, the best five will be counted as winners. As in previous contests, please send your solutions to Mr. H. W. Hetzel, 119 So. 37th St., Philadelphia, Pa.

## KRUCVORTENIGMO 1935




1935



1936

(Notu bone. - La litero "(r)" kie trovata en la ŝlosilo, signifas ke nur la radiko de l' vorto estas uzata por la enigmo.)

**HORIZONTALE**

1. Norda lando.
5. Depost nun.
8. Daŭre gliti.
13. Apetitilo.

**VERTIKALE**

1. Monkesto. (r)
2. Alia elektebla vojo.
3. Plej ofta prepozicio.
4. Unua ludkarto. (r)

(Horizontale and Vertikale continued on the following page)

KRUCVORTENIGMO "1935" (Continued)

HORIZONTALE

14. Apartenanta al persono kiu parolas Esperanton.
17. Floro (r).
18. Organizita grupo.
19. Bildo sub la haŭto (r).
21. Prepozicio pri posedo.
22. Konjunkcio (por dependa propozicio)
23. Ordono iri proksimen.
24. Seksdifina finaĵo.
26. Sen kio oni soifas.
29. Bakita manĝaĵo.
31. Posedi.
34. Sufikso signifanta "per kio."
35. Poemo (r).
36. Prepozicio de loko.
37. Prileĝa profesiulo.
43. Ricevitaj ĉiujn necesaĵojn.
49. Malgranda parto.
50. Maleksteriĝo.
51. Planto kun bluaj kaj blankaj floroj.
52. Prepozicio (pri nombro.)
53. Korpaj aŭdiloj.
54. Pronomo.
55. Malsuda (r).

VERTIKALE

5. Vorto de konsento
6. Kolektaĵo.
7. Nefermentinta pano. (r)
8. Sanigilo por digesta organo.
9. Komuna parto de multaj demandvortoj.
10. Sufisko pri profesio.
11. Fino de participo.
12. Okaztempo.
13. Apartenanta al pastro.
15. Tipnomo por ĉiu nedeklinaciebla vorteto.
16. Pronomo.
20. Faris unu el multaj.
22. Muzika kortbirdo.
25. Interjekcio (por milda atentigo.)
27. Pronomo.
28. Konjunkcio kun komparativo.
30. Poemo (r).
32. Plenda interjekcio.
33. Sufikso.
38. Estaĵo pli potenca ol homo.
39. Unuo por mezuri elektran rezistancon.
40. Serio de samkoloraj ludkartoj. (r).
41. Fino de adverba participo.
42. Teksaĵo (r).
43. Kontraŭo de "ekster."
44. Bone konita amsigno (r).
46. Milda trinkaĵo.
47. Mezuro de farmlando. (r) (Alia signifo estas, "kies rando estas tranĉa.") (r).
48. Lingvo (parolata en multaj landoj)(r)
50. Sufikso pri loko.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

We are indebted to Prof. Charles H. Briggs, Minneapolis, Minn., for the following obituary. The passing of Bro. Mitchell escaped our notice until recently. On another page is one of Professor Mitchell's compositions - "Sing Esperanto" - a worthy addition to every Esperantist's library.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## GEORGE WINTER MITCHELL.

Profesoro George Winter Mitchell, M.A. naskiĝis en la jaro 1865 en Glasgovo, Skotlando. Li studis tie kaj en Queen's University, Kingston, Kanado. Li estis profesoro de klasikaj lingvoj de 1906 ĝis 1922 en Queen's University. Poste li venis al Stamford, Conn., Usono, kie li loĝis ĝis ŝia morto lastan Aprilon, 1935. Li postlasis nur sian vidvinon.

Li verkis kelkajn lernolibrojn pri la latina lingvo kaj scienco -- notinde "Anthropology Up-to-Date," serioze-komikan klarigon pri Antropologio. Li verkis ankaŭ kelkajn poemojn kaj multajn artikolojn en monataj gazetoj.

Li interesiĝis pri Esperanto kaj tute mem-instruite mastriĝis de la lingvo. Lia plej bona traduko estas "Thanatopsis." D-ro Lowell diris pri unu tia traduko: "Vi faris belan verkaĵon kaj mi esperas ke vi donos ĝin al Amerika Esperantisto. Ĝi ne estas la verkaĵo de 'novulo' kiel vi modeste vin nomas sed de komprenema studanto." Lia traduko de The Man with the Hoe, estas fidela, preskaŭ laŭvorta traduko de la ideoj de tiu fama poemo de Edwin Markham.

Lia anglalingva traduko de La Espero gajnis la premion kaj estas presita en Amerika Esperantisto de Marto 1928. Aliaj tradukoj kiuj montrigis lian lertecon estas La Tagiĝo kaj Nova Kanto. Esperanto perdis altvalorulon.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

MARK THE DATES ON YOUR CALENDAR

| 1936 | | | JULY | | | 1936 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| SUN | MON | TUE | WED | THU | FRI | SAT |
| | | | (1) | (2) | (3) | 4 |
| 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 |
| 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 |
| 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 |
| 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | |

DETROIT JULY 1st - 2nd - 3rd 1936

## 29 TH ANNUAL CONGRESS OF THE E.A.N.A.

Gesamideanoj:

Ne diru: "estas ankoraŭ 6 monatojn ĝis la kongreso okazos" aŭ "Mi ankoraŭ ne scias nun ĉu mi povos atendi la kongreson" aŭ ne diru alimaniere. Finfine estas vi, por kiu la E.A.N.A. - kongreso estas aranĝota. La loka kongreso-komitato estas via laboranta agento kaj aranĝos por vi la interesplenajn amuzajn, vivindajn libertemp-tagojn. Ni nur demandas de vi, ke vi skribu al ni baldaŭe vian opinion kiamaniere vi ŝatus vidi la Detroit-kongres-tagojn. Ni kunvenos ĉi tie por kunlabori por la estonta progreso de nia movado. Por atingi ĉi tium celon ni ne povas laborigi nur kelkajn. Estas la devo de ĉiu esperantisto kunhelpi al la rekonstruado de nia organizo.
Skribu al la sekretario de la kongreso-komitato, samideano Erich Kavel
Detroit Mich. 7609 Nevada Avenue

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

## SING ESPERANTO

1.
Let us sing a new song of the language of love
For the goal we have set is in sight;
A new dawn is bringing new light from above,
Dispelling the shades of the night.

2.
Press onward then, brothers, whatever may come,
Though mountains and seas intervene,
Not led by a flag or tumultuous drum
Yet loyal, determined, serene.

3.
At last when our language is known everywhere,
And the nations commune with each other,
No longer shall men by land, sea or air
Plot ruin and death for a brother.

4.
Then sing Esperanto, the language of peace,
Though scoffers our efforts assail,
For enmity, conflict and hatred will cease
If Zamenhof's spirit, prevail.

George Winter Mitchell.

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

ORANGE, TEXAS. Sinjoro Kamame A. Susuki, nia estimata Japana samideano ricevis la viziton de S-ro Scherer kaj patrino. Lia ĉarma japana edzino preparis la faman "sukijaki" por la gastoj. (Por kompreni kio estas "sukijaki" legu en la Scherer-libro)

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

LUBBOCK, TEXAS - Nova Esperanto-Oazo en la mezo de la polvo-centro de la "Sovaĝa Okcidento". S-ro J. F. Ward histori-instruisto ĉe la High School instruas grandan Esperanto-klason - 60. Li ankaŭ venigis S-ro Scherer por doni prelegon pri Bali.Oo,Oo la,la.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

## "FRATECO"

Unika en Esperantujo, kiu portas altan idealon, propagandas laŭnaturan vivadon, pacideojn, kontraŭmilitarismon kaj konatigas al siaj legantoj la fundamentajn naturajn leĝojn el kiuj la nuntempuloj flankiĝis.

Abonkotizo 1 frsv., 3 internaciaj respondkuponoj. - Postulu specimenon.
Adreso: Redakcio Frateco, Sevlievo, Bulgarujo.

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

***********************************************************************

SE VI ESTAS AMIKO de E.A.N.A. kaj U.E.A. PAGU TUJ VIAN KOTIZON

***********************************************************************

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

***********************************************************************

Esperanto Association of North America. 1517 H Street, N.W., Washington, D. C.

MEMBERSHIP RATES - FIXED AT 28th CONGRESS

Class I - Membership in EANA and U E A, with "Amerika Esperantisto" . . . . . $1.50
Class II - Above combination & Jarlibro (a directory of World Esperanto) added. 2.75
Class III - Above combinations & the monthly magazine "Esperanto" ($1.75) added. 4.50
Come in any time - Your year begins the date of your receipt, (instead of October 1st as formerly) (EANA with "AE" $1.50) (Jarlibro, additional $1.25) ("Esperanto", additional $1.75) (Total $4.50)

***********************************************************************

TEXTBOOKS Dr. Reed's "Practical Grammar" - A course suitable for all grades 75¢
Prof. Kenngott's "Esperanto Course" speaks for itself - and teaches you. $ 1.00
(The authors of both above courses are recognized as World Authorities on the language)
Prof. Kenngott's Pocket Dictionary-Two-way. A worthy companion to any course. 25¢
Froding's "Easy Course in Esperanto" - a splendid 'starter' of 8 lessons. 10¢
Sussmuth's "American Esperanto Key" - alphabet, grammar & vocabulary 5¢
"Edinburgh Dictionary" Esperanto-English, English-Esperanto 288 pp. 4 x 6 $ 1.00

| | |
|---|---|
| Esperanto-English by E.A. Millidge. The BEST Esperanto Dictionary in any National Language. 500 pp. Price $2.75 | English-Esperanto by Joseph Rhodes, a useful companion to the Millidge. Postpaid - - $1.10 (547 pp.) |

Easy - and interesting reading: "Fabloj de Ezopo" 25¢, "Zamenhofa Legolibro 50¢, "Esperanto for the Globe-Trotter" two for 5¢, "Sub la meznokta Suno" 25¢, "Sep Ridoj" 25¢, Ĉiutaga Vivo (Kenngott) 25¢, "Facilaj Esperantaj Legaĵoj" 50¢.

***********************************************************************

"A Picture is Worth 1000 Words" Postage Stamp Type (and size) Photographs, gummed ready to stick, from any picture. 100 for $ 1.00, 500 for $ 4.00, 1,000 for $ 7.00. Original returned unharmed. Used on Birthday, Gift, Graduating and all kinds of greeting Cards.

***********************************************************************

SAVE ON MAGAZINE SUBSCRIPTIONS - Club and Special Rates. Any offer matched. Any Magazine, Any Time, Any Where. New or Renewals. Send for list and save money.

***********************************************************************

PHOTOGRAPHS of DR. ZAMENHOF 5x7 25¢ 5 for $1.00 8x10 65¢. Postage Stamp Size, 12-15¢.

***********************************************************************

JOSEPH R. SCHERER, author, lecturer and world traveller, saw and photographed the unusual, in almost fifty lands, tells about it in "Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo", cloth $2.25, Paper, $1.60 - plus postage, 15¢. Now writing a series of "Travel in America" articles in "Heroldo de Esperanto" dealing with his lecture tour through America. Subscriptions, 3 months, $ 1.00, 6 months $ 1.70, 12 months, $ 3.40.

***********************************************************************

Advertising rates for small announcements in "American Esperantist": Classified, 1¢ per word - minimum 25 words. Space, 1 x 3 1/2 inch, 50¢ - 3 insertions for $ 1.00, 1/2 page $ 3.00, Full page, $ 5.00. Send copy by the 20th.

***********************************************************************

ORDER FROM ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA. 1517 H Street, N.W., Washington, D.C.

***********************************************************************

Kopioj de "Amerika Esperantisto" estos sendataj al kiu ajn adreso de Usono aŭ eksterlando kontraŭ sendo de neuzitaj usonaj poŝtmarkoj por 10 cendoj.

***********************************************************************

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE E.A.N.A.- & BRING IN A NEW MEMBER

***********************************************************************